# Zamenhofa tago 2010

## Nepalo

Nepala Esperanto-Asocio festis Zamenhof-tagon kiel kutime la 15-an de decembro. Partoprenis 16 membroj. La programo komenciĝis per lumigado de kandeloj. La prezidantino Indu Devi Thapaliya, konsilanto s-ro Philip Pierce, KAEM-ano s-ro Mukunda Raj Pathik, vic-prezidanto Posh Raj Subedi kaj membro s-ro Navin Lal Shrestha lumigis po unu kandelon antaŭ bildo de Zamenhof. Gastoj el Francio, gesinjoroj Jean-Pierre kaj Mathé Fedak, favoris la festenon per sia neatendita ĉeesto. La ĉeestantoj faris laŭvicajn festajn paroladojn.

**Bharat Ghimire**

## Ĉinio

La 18-an de decembro oni festis en la sidejo de Kantona Esperanto-Asocio la Zamenhofan Tagon. Nome de la lokaj esperantistoj salutis s-ro Liang. Prelegis la hispanaj esperantistoj Rafael Mateos kaj Augusto Casquero, kaj la irana samideano Hamzeh. Nome de la lernantaro salutis la juna lernantino Corazón el lernejo en la urbo Foshan, kie oni instruas Esperanton. Post la paroladoj oni disdonis al la lernantoj diplomojn de Esperanto kaj de la hispana lingvo. Sekve okazis komuna fotado (vidu sube) kaj solena manĝado.

**Augusto Casquero**

## Ĉeĥio

Laŭ instigo de Jarmila Rýznarová la ĉiutaga komuna nokta programo de la Ĉeĥa radio, la radioforumo "Nokta linio", dum du horoj ĉirkaŭ la noktomezo de la 15-a al la 16-a de decembro havis kiel sian temon "Esperanto kaj lernado de fremdaj lingvoj ĝenerale". Dum 74 minutoj (plus muzikpaŭzoj) oni akceptadis kontribuojn de aŭskultantoj, kiuj telefonis al la studio aŭ skribis retpoŝte. Oni aparte invitis kontribui personojn kiuj scipovas Esperanton. Enkonduke menciiĝis la naskiĝtago de Zamenhof kiel motivo de la temo. Estas pozitive ke ne aperis negativa opinio pri Esperanto. Kelkfoje kontribuis esperantistoj, sed ankaŭ neesperantistoj plurfoje menciis sian renkontiĝon kun la lingvo, aŭ almenaŭ montris simpation por ĝi.

## Indonezio

Ekde sia fondiĝo la 3-an de oktobro 2010 la klubo "Esperiga suno" jam faris kelkajn agadojn. Unu el ili estas festado de la Z-tago, kiu okazis vespere la 15-an de decembro en butika centro en Ĝakarto. Abdul Haris, la klubestro, komencis ĝin per laŭtlegado de retmesaĝo de Heidi Goes, en kiu ŝi esprimas sian ĝojon pri la Zamenhof-tago en Ĝakarto kaj kuraĝigas plulerni Esperanton.

La 18-an de decembro oni festis en la sidejo de Kantona Esperanto-Asocio la Zamenhofan Tagon. Foto: la aŭtoro

## Tajvano

Zamenhof-feston 2010 okazigis la Pingtung-a Esperanto-grupo sabate la 18-an de decembro en la kongresa halo de la Pingtung-gubernio. Kvindeko da homoj venis al la festo. Inter la elstaraj gastoj estis Grego Kay kaj David Bell el Usono, Sean Ravenscroft el Sudafriko, prof. You Manlai kaj prof. Cho Chao-ming (Abengo). Oni povis ĝui riĉan programon kun kantoj, kurso de signolingvo, korpa ekzercado kaj prelegoj.

## Pollando

Zamenhofaj Tagoj kun Internacia Pedagogia Esperanto-Kurso en Bydgoszcz okazis de la 13-a ĝis la 19-a de decembro. AIS-kursojn gvidis Regina Grzębowska, Miroslawa Korniluk, Alojzy Szulc, Cezary Koscielak kaj Aleksandra Welna. La kursoj finiĝis per bakalaŭra seminario, gvidata de Aleksandra Kowalczyk.

Lunde (13 dec) la E-klubo ĉe Pola Asocio de Nevidantoj en Bydgoszcz aranĝis Zamenhofan Feston, en kiu pri Zamenhof kaj E-literaturo prelegis Urszula Tupajka. Ĵaŭde (16 dec) ĉiuj ISTK-studentoj veturis al Toruń, kie AIS-kurson pri Esperanto gvidis Teresa Nemere. Okazis vizito al la Domo de Kopernik, kun bakado de spicaj mielkukoj, vizito de la urbo kaj de la Etnografia Muzeo kun ekspozicio de Betlehemaj staletoj en la mondo, kiun gvidis en Esperanto Maria Pokrzywnicka.